ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)
REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Feletona red.: Zanoni.
ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtĉekkonto Köln 70865, por Teo Jung, Horrem.
ANONCOJ
el ĉiuj landoj 5 germ. mk., po cm². Ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato.

ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

Internacia **SEMAJNA** **Neŭtrala**

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed **ne** per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe **admonilon.** — Abonoj povas esti -- -- - komencataj per iu ajn numero. - -- --

Por **Abono** oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 svis. fk., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 5½ pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 4 germ. mk. (por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj), 2 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., -- -- -- 50 pol. mk., 70 aŭstr. kr.; internacie 1 respond-kupono. -- -- --

Por adreŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 5 numeroj. — Liston de niaj **Abonejoj** en diversaj landoj -- -- -- -- - vidu sur paĝo 4! - -- -- -- --
Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoficejo (kvaronjare 48 mk.); senpera alsendo sub banderolo -- -- -- kostas kvaronjare 65 mk. -- -- --

Numero 87 :-: **Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa** :-: **4. Junio 1922.**

?

Ĉu vi jam uzis propagandacele nian numeron pri la Centjar-Ekspozicio en Rio de Janeiro?
Ĉu vi zorgis, ke artikol(et)oj pri la Ekspozicio aperu en naciaj jurnaloj?

?

Antau Unua Kongreso de Pollanda Esperantistaro en Varsovio.

„En la mondon venis nova sento! . "

Kiel malproksima estas tiu tempo, kiam en modesta libreto, salutita per maldiligenta indiferenteco de amaso, per mokoj de memfidaj gazetoj kaj per admiro nur de nemultaj personoj — ekdiris Zamenhof tiujn ĉi vortojn en lingvo tiam ankoraŭ ne parolata — en sia propra lingvo!

Se oni povis tiam dubi pri profeta spirito de tiu homo kaj tiujn vortojn juĝi, kiel elfluo de senfina naiveco aŭ senfina vanteco — nun por la homo, kiu enpenetris kore mondon Esperantan kaj ne rigardas ĝin nur elflanke kun rideto de nefidanta Tomaso, ĉiuj duboj devas ĉesi!

Krei „novan senton" — vere ĝi ŝajnas manio de grandeco. Ĉu povas ankoraŭ naskiĝi novaj sentoj? Se oni parolas pri sento de kunligiĝo de nacioj, de frateco de popoloj, de unueco homkultura kip. — ĉu tiuj ideoj ne estis jam antaŭ jarcentoj al ni profetitaj? Ĉu ne parolas al ni pri ĝi evangelio? Ĉu tiaj alvokoj ne sonis inter ventego de revolucio franca? Ĉu ne estis prikantataj sur pintoj de poezio romantika en ĉiuj landoj?

Tamen en nevidebla fadeno, kiu kunligas disjetitajn en tuta mondo Esperantistojn kaj en flama ondo de l' entuziasmo, en kiu jam dektrifoje dronis la valoroj kongresaj — estis io apartega, estis nova sento, naskita en idea lando Esperantujo, nova sento, komprenita nur per multnacia nacio de tiu ĉi lando.

Kio ĝi estas — ni ne povas ĝin difini. Ankoraŭ ne ekzistas psiĥologo, kiu tiun novan senton difinus precize kaj klare . . .

Estas ankaŭ sendube, ke ĉe anoncita kunvoko de ĉiuj polaj Esperantistoj en ĉefurba centro de sendependa Respubliko la nova sento devas movigi la tiel kore fratigitan popolon Esperantan. Ĝi estas sento duobla — kvazaŭ dupolusa; sur unu ĝia poluso — spite al frosteco de teraj polusoj — flamas la fajra entuziasmo de tuta alilanda mondo Esperantista, sur la alia ekbrulas lumo de ĝoja pola fiero . . .

Ĉar unuflanke la eksterlando vidas kun plezuro, ke al la triumfa marŝiro de Esperantistoj ĝis fratiĝo aliĝas nova organizita ĥoro, iranta sub standardo, kies verdan brilon riĉigas propraj naciaj koloroj. La Esperanta mondo rimarkas en tiu solena momento, ke al ĝia granda estonteca familio venas nova membro — nova frato, kiu ĉe komuna altaro juras fidelecon al la komuna ideo.

Kaj duaflanke la mondo de polaj Esperantistoj fiere kaj gaje rimarkas, ke aperante hodiaŭ sub propra ŝtata standardo ĝi jam kapablas paroli ne nur en la nomo de negranda grupeto de idealistoj-revuloj subteraj, ke ĝi parolas en nomo de propra nacio, kiu akiris la eblon disponi pri sia destino, la rajton kaj devon de morala respondeco antaŭ tuta mondo.

Nur nune, kiam Pollando forjetis la katenojn de dependeco, ĝi estas „vi-mem" — nur nune ĝia voĉo: „mi volas esti fratino de ĉiuj popoloj en Esperantujo!" — sonas kiel voĉo de vera konscio kaj forta volo.

Do ĉar Esperanto estas spirita telegrafo de nacioj, oni povas diri kuraĝe, ke en tiu horo estas fondita nova linio, tra kiu fluo de profunda simpatio kuras de pola koro al la koroj de ĉiuj teraj nacioj kaj reciproke, ĝi kuras en karaj vortoj de la belsona Esperanto.

Ni, polaj Esperantistoj, komprenas profunde, ke pro ĝisnunaj malfavoraj al memstara disvolvo kondiĉoj ni restis iom malantaŭe en sfero de Esperanto post aliaj popoloj, kiuj vivinte en pli feliĉaj cirkonstancoj imponas al ni per sia brilanta aktiveco en la sfero de disvastigado de la lingvo internacia. Kaj nome tial, ke ni vidas, kiel la aliaj postrigardas nin, vokante nin antaŭen, nome tial, ke ni komprenas, kiel ni malfruiĝis — ni volas laŭ devo nia egaligi nian marŝon kun alilandaj fratoj, ni turniĝas kun solena alvoko en ĉiujn flankojn de nia gepatra tero al polaj Esperantistoj:

„Vi disjetitaj kaj dispelitaj, kiel birdaro en la horo de ventego, flugu tra ĉiuj vojoj kaj vojetoj al la ĉefurba nesto, ariĝu ĉi tie, kreu novan ligilon, kiu, kiel malpli granda sed estiminda tutajo, eniros la grandegan tuton homaran, kian prezentos la antaŭvidita per profeta okulo de granda praktika revinto Zamenhof — Esperantolando!"

Ni esperas, ke niajn bonajn intencojn gvidos Fortuno: kongreso sur la pola tero, kiu estas kvazaŭ Esperanta Beth-el, ĉar tie ĉi ekbrilis unufoje matena stelo de Esperanto — sur tiu tero, kiu estas samtempe la Esperanta Mekko, ĉar tie ekripozis la cindroj de ĝia kreinto — tiu kongreso inĉiatita per konkorda volo de ĉiuj pollandaj societoj devas sukcesi kaj alporti la atendatajn bonajn fruktojn!

Leo Belmont.

Al Pollandaj Esperantistoj.

Leo Belmont.

Hirundoj polaj, flugu, flugu,
Al nia stelo verd-brilanta . . .
Per amideo korojn jugu,
Poluj' — lulilo Esperanta!

Novajon portu, packolombo,
Pri la kongreso kunliganta .
Ariĝu ni ĉe Majstra Tombo
En nia Mekko Esperanta!

Movigu korojn fajrinvito
Por ke kuniru grandamaso . .
El nuboj vokas nin spirito —
Grabowski, Princo de Parnaso!

Pollando, metu Vian koron
Ĉe Esperanta fratalтaro .
Ni organizu novan ĥoron
En la venkiro de l' homaro!

Esperanto en Pollando.

La Organiza Komitato de Unua Pollanda Kongreso invitas min skribi „koncizan artikolon" pri Esperanta movado en nia patrujo.

Esperanto en Pollando?!

Tio ja estas temo, pri kiu oni povus verki libregon, dikan kiel „Fundamenta Krestomatio" aŭ „La Faraono", kaj ankoraŭ multo lasus sin aldiri!

La Majstro estis filo de tiu ĉi tero. Li naskiĝis en Bialystok, li kreis Esperanton en Warszawa, kie li vivis dum longaj jaroj, ĝis la morto, kiel modesta kuracisto kaj nekonata geniulo. „Pola koro batas en la akcento de nia lingvo", pola tero donis ripozon eternan al la korpo de nia granda Instruinto.

Jen la bazo. Kaj kiel silenti pri tiu brilanta spirita Plejado, kiu ĉirkaŭis D-ron Zamenhof dum unuaj, plej pezaj jaroj de lia heroa, apostola batalo por nova ideo, por la „nova sento", kies ni estas filoj kaj kiu iam ŝanĝos la aspekton de homa tutmondo?

En la koro de Majstro kreskis luma floro, kies radioj penetris liajn kunvivulojn kaj kreis potencan fluon de talentoj, donacis al Esperantistaro grandiozan komencon de ĝia literaturo. Antoni Grabowski metas aglajn flugilojn al la Esperanta Poezio. De kvardek naciaj genioj li kunigis la ĉarmon, kaj finis sian nekompareblan verkon per granita monumento de „Sinjoro Tadeo", enfermanta en enspiritaj strofoj la vivan animon de pola pasinteco. Kabe (D-ro Kazimierz Bein) estas nia modela, mirinde fruktoriĉa prozisto. Kaj kiel forgesi pri nia unua historiisto Zakrzewski, pri forta Poeto, kia estas D-ro Leono Zamenhof, la frato de nia Majstro, pri fervora propagandisto Brzostowski, pri redaktoro Leo Belmont*), aŭtoro de unua scienca studo pri nia lingvo, de „Sonoj Esperantaj", de Esperanta gramatiko en polaj versoj?

Tiujn imponajn pioniroj de Unua Epoko digne sekvas la dua generacio de Esperantaj verkistoj. Lodzaj poetoj, Braun kaj Karolczyk (kies poeziojn vi legos en tiu ĉi numero) estas, sub pseŭdonimo de „Elski kaj Eska", la aŭtoroj de „Unuaj Agordoj", libreto de originalaj Esperantaj versaĵoj, kiu trakuris tutan terglobon kaj — ho mirindaĵo! — vendita estis en 20000 ekzempleroj!

Kaj ĉu ni ne ŝuldas multajn momentojn de dolĉa plezuro al Bronislaw Kuhl el Kraków, al Dobrzanski kaj Kozlowski el Kielce, Czerwinski kaj Stankiewicz el Warszawa, al juna poeto Julian Tuwim, al tiom, tiom da aliaj, kiujn neeble estas mencii? La historio de nia movado pesos senpartie kaj juste ilian meriton. Mi povis nur, en kelkaj vortoj, aludi apenaŭ la

*) Lia frato, mortinta D-ro Aleksander Blumental, estis fondinto de unua en la mondo Esperantista grupo.

Legendoj pri Varsovio

(pole: Warszawa, legu Varŝava).

Kolektis laŭ ordono de l' Organiza Komitato de l' I-a Tutpola Esperanto Kongreso en Varsovio

Edvardo Lonkopolanski,
profesoro (diplomita) de Esperanto en „Konkordo"

Ne multaj estas la rakontoj kaj fabeloj pri fondiĝo de Varsovio. Ne riĉaj ili estas. Tre kaj eble eĉ tro modestaj estas la enhavoj de la legendoj, kiel fondiĝis la ĉef-urbo de Polujo. Ni tamen citu ilin tiel, kiel ili ekzistas en la popolo, en la lernolibroj por infanoj. Eble tio estos por kelkiu interesa.

I (la plej populara).

Antaŭ tre, tre longa tempo tie, kie nun staras Varsovio, estis netrairebla arbarego. Pli longe ol ĉie alie, ekzistis ĉi tie la arbaroj, ĉar, kiam ĉe la Varto, malsupra kaj supra Vistulo formiĝadis jam regnoj, ĉi tie en Mazovio estis trankvile, nur eternaj arbaregoj ĉiam bruadis.

En tiun ĉi praantikvan ĉasejon enveturis foje dum ĉasado la duko Kazimiro. Kiu li estis, ne estas konate. En la tempoj, kiam sovaĝaj bestoj libere marŝadis tra la nunaj stratoj varsovia, oni ne skribadis bapt-atestojn pri homoj kaj ne gardadis tiajn inter la aktoj en la arĥivejoj. La nomon Kazimiro (Kazimierz) oni de tre, tre longe volonte donadis en Mazovio.

La duko devojiĝis en la arbarego kaj tre malsata alvenis al monteto ĉe l' rivero. Tiu ĉi rivero — estis Vistulo (Wisla), kaj sur la monteto apud ĝi la duko rimarkis malgrandan kabaneton plektitan el brancoj.

En la kabaneto kuŝis malriĉa virino, ankoraŭ luna, sed tre mizeriĝinta. Per la pro malsato seka brusto ŝi nutris du infanojn, naskitajn ĵus antaŭ la alveno de l' duko.

Varsovio. Ponto trans Vistulon.

Kaj, ĉar la duko estis bona, li prenis la infanojn sub sian protekton kaj prezentis ilin al la sankta bapto-ceremonio sur siaj dukaj manoj.

La knabon oni nomis Varŝo (Warsz) kaj la knabinon Savo (Sawa).

Ĉirkaŭ la malriĉa kabano, allogitaj per la duka favoreco, komencis ĉiam pli kaj pli amasiĝadi novaj loĝantoj, kaj la nomoj de l' dukaj gebaptofiloj donis la nomon al la kolonio, kiun oni nomis Warszawa.

Laŭ la legendo la kabano, en kiu loĝis Varŝo kaj Savo, staris sur tiu sama loko, kie nun (sur la malnova urbo-placo Stare Miasto, en la angulo de l' str. Piwna kaj Dunaj) staras ŝtondomo signita per n-o 31.

Laŭ *Z. Bukojemska.*

II.

Inter la multaj forpelitaj el Bohemujo familioj troviĝis unu ĉeĥa ekzilito kun la nomo Var (Varŝ) kiu elektis kiel sian refuĝejon la Mazovian duklandon. Li ekloĝis ĉe la bordo de l' Vistulo kaj iom post iom fondis tie sian kolonion. La vilaĝanoj ĉirkaŭaj nomis la terpecon, kiun Varŝo okupis: „grunta Warszowe", kio laŭ mazovia elparolado signifis: tero de Varŝo (aŭ pli ĝuste: Varŝ'aj teroj).

Pro sopiro je sia patrujo la ekzilito nomis la tero transe de l' Vistulo — Praga, kio rememorigadis al li sian naskourbon.

La nomo Warsz en la historio estas konata. Iu kastelestro en Krakovo portis ĝin.

Laŭ afabla komuniko de
s-o F. Lotto.

III.

Antaŭ tre, tre longe, kiam sur la loko, kie nun etendiĝas la belega Varsovio, troviĝis netraireblaj arbaregoj, en kiuj libere vagadis sovaĝaj bestoj kaj rabaj birdoj havis siajn nestojn, staris sur monteto ĉe l' bordo de Vistulo kabaneto plektita el brancoj. La loĝantino de tiu dometo estis malriĉa vidvino Savo (Sawa), kiu perlaboradis sian vivon kuirante manĝaĵojn por la preterveturantaj flosistoj. Kiam sur sur siaj pramoj la malsataj flosistoj rimarkadis de malproksime ŝian kabaneton, ili kriadis al ŝi laŭte: Warz (legu Vaj) Sawo!, kio en pola lingvo signifas: kuiru, Savo!

La flosistoj iom post iom konstruadis siajn konstantajn loĝejojn ĉirkaŭ kaj apud la vidvino kaj nomis la kolonieton, kiun ili formis, antaŭe Warzsawa kaj poste ŝanĝis en Warszawa (Varŝava).

Laŭ rakonto de l' 11-jara
Ludoviko Wizenfeld
(lernanto de 1. kl. de l' Komerca Lernejo.)

De kie devenas la Varsovia blazono?

(La sireno kun alten levita glavo en la mano.)

Multaj kaj diversaj estas la legendoj pri belega virino, kiu devis ŝanĝiĝadi en fiŝon por eviti danĝerojn, kiuj ŝin minacadis, sed nenio oficiala estas pri tio citita en la historio. Laŭ plej certaj supozoj (Gloger: La historia geografio de antikva



Varsovio. Kastelo.

ĉefajn nomojn. Ili memorigis al vi principe la ĝisnunan signifon de Pollando por la Esperanta movado.

Sub fremda jugo, disŝirita en tri partoj, per fajro kaj ŝtalo frapata dum la Granda Milito, en nuna momento malfacile leviĝanta de postbataĵa mizero, la patrujo de Zamenhof povis oferi al propagando de la Verko de sia genia filo nek sufiĉe da homoj, nek da monrimedoj.**) Antaŭ la milito, pro ŝtatlimoj, dispartigantaj la landon, neebla estis unuigo de Esperantaj fortoj. En la Rusa Parto, krom unuaj rondoj, fonditaj de la Majstro mem kaj de liaj personaj amikoj, funkciis regule de 1906 la „Pola Esperantista Societo“ en Warszawa, kun kelkaj provincaj filioj. En Aŭstria Parto ekzistis delonge la „Societo Esperanto“ en Kraków, en la Germana — la „Pola Esperanto-Societo“ en Poznan.

Post la liberiĝo de Pollando, la Pola Esperantista Societo kreskas rapide. Krom la Varsovia Centrejo, ĝi enhavas grupojn en 10 provincaj urboj: Poznan, Lodz, Kalisz, Koluszki, Olkusz, Pabjanice, Ruda P., Siedlce, Zdunska Wola kaj Kraków (organizata). En Warszawa fondiĝis antaŭ unu jaro la „Esperantista Rondo Konkordo“, fervore laboranta societo (nuntempe 6 provincaj filioj), kiu propagandas ankaŭ la internan ideon de Esperanto; tie ankaŭ ekzistas de kelka tempo laborista organizajo sub la nomo „Esp. Societo Laboro“, fortike disvolviĝanta.

Grandaj memstaraj provincaj societoj ekzistas en: Lodz (ĉk. 600 m., tre vigla propagando!), Kraków, Lwów, Bialystok (naskiĝurbo de la Majstro), Bielsko, Bydgoszcz (utila agado de „P. E. Servo“, kies gvidanto estas Fr. Prengel) k. a., entute ĉirkaŭ 70 grupoj. La nuna Kongreso devas kunigi ĉiujn ĉi organizajojn en unu federacio, lasante tamen al ili plenan internan liberecon.

Ni firme esperas, ke en sendependa ŝtato, ĉielo pollanda mezuros de nun pli favorajn tagojn al nia movado. Kiam antaŭ 10 jaroj okazis la jubilea Krakova Kongreso, Grabowski en kortuŝanta versajo „La reveno de l' filo“ pentris majstre la ĉagrenon de Warszawa, lulilo de Esperanto, kiu troviĝante en fremda mastreco ne povis tiam inviti la Esperantistaron:

„Ve! ne mastras mi kabanon,
Nek liberan havas manon;
Mi, en mia propra domo,
Estas kvazaŭ fremda homo.“

Sed la tempoj aliiĝis. Kaj ni atendas vin, Samideanoj. Warszawa large malfermos al vi siajn pordegojn en la triumfa momento, kiam la mondo konvinkiĝos, ke Esperanto ne estas utopio, ke ĝi estas unu el plej grandaj bonfaroj, kiujn individuo oferdonis al Homaro.

Vi tiam kunvenos de la tuta globo, vi kunvenos multmile, klini viajn verdajn standardojn antaŭ la tombo de nia glora Majstro. Kaj ni solenos kune la radian horon de la Venko.

Okazu ĝi baldaŭ! *Jan Kostecki,*
Vicprez. de Pola Esperantista Societo.

**) Ankaŭ tiurilate ne mankis tamen ekzemploj de granda oferemo. Kolonelo Jan Günther el persona kaso ĉiujare elspezis por Esperanto kelkajn milojn da tiamaj oraj rubloj. Li donacis al ni tiamaniere imponan kolekton da elegantaj eldonoj, kaj precipe la belan kaj ričan „Polan Esperantiston“.

Esperanto en Pola Lando.

BYDGOSZCZ. „Societo Esperanto“ aranĝis propagandan ekskurson al Rynkowo kun partopreno de pli ol 50 p. — Fondiĝis „Rondo Teozofia“ por flegado de pli alta kulturo spirita kaj interfratigo de l' homaro. Kunvenoj devigaj ĉiumerkrede je 8—10 h. vespere en Aŭtodidakta Universitato. Aliĝi povas ankaŭ ne-Esperantistoj, sed por frata interrilato scio de Esp. estas nepre necesa, ĉar jam nun apartenas pol- kaj germanlingvanoj.

LESZNO. Gazetoj „Glos Leszczynski“ kaj „Oredownik Wrzesinski“ ofte raportas pri Esp. Poluĵo) la nuna blazono estas fina formo de multaj diverse kun la tempo ŝanĝiĝintaj figuroj.

En la arhiveloj oni trovis stampon de Królewiec (Königsberg) el 1450 j. kun ties blazono, prezentanta la sanktan Georgon kun glavo en mano, mortigantan drakon kun skvama ventro kaj longa vosto. En 1598 j. tiu blazono estas jam prezentita parte defrotita, parte ŝanĝita riel, ke la kapo de l' drako jam tute ne estas videbla, la korpo de S-ta Georgo iom ŝanĝita kaj anstataŭ lia vizaĝo estas tiu de virino. En 1633 j. ni trovas jam ĉe l' reĝa arhitekturisto Jarzebski pretan sirenon kun glavo en la mano, levita alten.

Tio estas la plej certa hipotezo pri l' deveno de l' Varsovia blazono.

* * *

Antaŭ nelonge mi legis en la gazetoj la jenan komunikaĵon:

„Dum la lasta kunsido de l' Historia Fakultato de l' Varsovia Scienca Societo, sub prezido de s-o J. Kucharzewski, estis prezentita de s-o Wincenty Trepanowski (aŭtoro de „Genealogio de l' blazona simbolo de Varsovio“) dokumento, afirmanta liajn pruvojn pri l' deveno kaj signifo de l' primitiva figuro, akceptita kiel blazona simbolo de nia urbo. Tio estas arta tetramorfo (kvarfiguro) kunmetita el homo, aglo, leono kaj bovido, simbolo de 4 evangelioj. Tiu ĉi tetramorfo estis trovita en 1902 en Opole (Oppeln) en Silezio kune kun dekkelkaj objektoj oraj kaj arĝentaj. Ĝi povis esti proprajo de Boleslavo I-a († 1313), la Oppeln'a duko. Ĝi atestas, ke la plej antikva figuro de l' blazono de Varsovio povis esti sufiĉe populare konata ĉe ni en XIV-a jarcento, kaj ke ĝi apartenas al vico da mirindajoj, kiujn oni en la jarcentoj XIII-a kaj XIV-a volonte metis sur moneroj, sigeloj kaj blazonajn ŝildojn.“

* * *

Estu al mi permesate ĉi-loke publike danki s-on F. Lotto, kiu fervore helpis min en kolekto de materialoj.

Edvardo Lonkopolanski.

Legendo pri la Vistulo
(pole Wisła).

I.

En mallumaj landoj vivis potenca reĝo, nomita Beskid kun sia edzino Borana, la regantino de arbaroj kaj bestoj. Kiam Beskid mortis, Borana ekloĝis sur plej alta monto kaj edukis siajn tri infanojn: du belegajn filinojn Czarnocha'n (Nigrulinon) kaj Bialka'n (Blankulinon), patroninojn de akvoj, kaj filon Lan'on, kiu devis regi herbejojn kaj kampojn.

Kiam Borana eksentis sin próksima al la morto, ŝi rekomendis al siaj filinoj diskondukadi akvon tra la mondo, kaj al la filo fondadi herbejojn kaj kulturigeblajn kampojn. La obeemaj infanoj plenumis la volon de l' patrino. Lano fruktigadis la teron kaj semadis en la kampoj pandonajn grenojn. Czarnocha, ekplorinte, malsupreniris laŭ kvieta deklivaĵo en valon sudflanken, kaj la vigla kaj gaja Bialka ekkuris norden, ne atentante la rokoin kaj abismojn, kie en valo, je sia grandega ĝojo ŝi renkontiĝis kun sia fratino Czarnochal. Ekde nun ili decidis neniam separiĝi kaj kune paŝi pluen. Sed malproksimen ili ne venis, ĉar la Czantor (Ĉantor) kun siaj fratoj baris al ili la vojon kaj fermis ilin en la valo.

La fratinoj estis tre feliĉaj, ĉar Czantor ŝirmadis ilin kontraŭ malvarmaj ventoj kaj varmegaj sunradioj; kaj pro dankemo ili rosadis la montdeklivojn, kiuj baldaŭ kovriĝis per belegaj arbaroj, plenaj da herbo kaj floroj.

II.

Sed foje la patrin-tero ordonis al la montoj disŝoviĝi kaj ellasi la akvojn. Czantor devis obei, sed timis lasi la fratinojn sur nekonatajn vojojn kaj tial sendis nur unu ondon, ke ĝi esploru la vojon. La fratinoj faris kronon el la surbordaj floroj kaj, ornaminte per ĝi la elsendatan ondon, adiaŭis ĝin kore.

La unua ĉi ondo, nomita Wyszla (signifas pole: eliris) aŭ Wisła, eliĝinte el la amataj montoj, volis jam reveni al siaj fratinoj, sed rimarkinte la Krakovajn montojn direktiĝis al ili kaj estis ĝojplene de ili akceptata. Poste ĝi vizitis la bordojn de Sandomierz, Varsovio, Plocko, Wroclaw, Torun, kaj trafluinte la Ĥolman teritorion ekkuris al Danzigo ĝis la maro.

Post tiu ĉi unua ondo, la fratinoj elsendadis ĉiufoje aliajn ondojn, kiuj fluas laŭ la sama vojo. Kaj estiĝis tio tiam, kiam la suno leviĝis plej alten kaj plej bele ekfloris la kreskajoj. Ekde tiam je memoro de tia okazintaĵo, la knabinoj laŭlonge de l' tuta bordo de Vistulo festas la florkronojn, la antaŭtagon de S-ta Johano, fallasante sur la akvon kronojn el floroj. Ekde tiam ankaŭ la akvon, trafluantan la valon, al kiu malsupreniris Czarnocha, oni nomas „Wisla czarna“ (Vistulo nigra), kaj ĝian fratinon Bialka (blanka). La monto, sur kiu loĝis Borana, nomiĝas Barania, kaj tie, kie loĝis Czantor, Czantorio; la popolo, loĝanta inter la montaroj — montaranoj kaj tiu en la valoj — Lan'oj, Lach'oj, Polan'oj aŭ Polak'oj (Polo — estas pole: Polak).

Laŭ B. Hoff
Esperantigis *Edvardo Lonkopolanski.*



Popoltipo el la Lando de nia Dekkvara: Finnlapono.

Fondiĝis Esp. grupo „Nia Estonteco“, prez. s-o Grodzki. Kunvenoj en kafejo „Metropol“. S-ano Monarszynski gvidas novan kurson (12 p.).

+LWÓW-LEOPOLO. La ĉi tiea popoluniversitato aranĝis la 26. 4. prelegon „Pri Esperanto“ faritan de eloKventa parolanto s-ano inĝeniero I. Schnitzer. La ĉeestantaro, konsistanta plejparte el akademianoj kaj inteligentularo, estis ravita per la beleco de nia lingvo, aŭdante la reciton de diversaj poeziaĵoj, interalie de Słowacki „Mi malĝojas, Sinjoro“ trad. de Grabowski, deklamata de artisto Barwinski. Plibeligis la vesperon operaj gekantistoj f-ino Plati kaj s-o Popow, kantante en Esp. arioin el „Halka“ de Moniuszko kaj „Carmen“ de Bizet. Interalie ĉeestis kelkaj reprezentantoj de en- kaj eksterlanda gazetaro.

POZNAN. La urbon vizitis malofta gasto: s-ano Percy Hudson el Melbourne (Aŭstralio). Li sciipovas nur anglan kaj Esp. lingvojn, kaj la lasta faris al li la plej grandajn servojn en la ĝis nun nur en Eŭropo vizititaj 20 landoj. Akceptis lin s-o Borkowski, del. de UEA, kaj s-o Lewandowski.

Letero el Pola lando.

Bydgoszcz, majo 1922.

La postmilita tempo interalie plifortigis la movadon kontraŭalkoholan. En Ameriko oni antaŭ iu tempo tute malpermesis la publikan vendadon kaj uzadon de alkoholo. La samo okazis en kelkaj eŭropaj ŝtatoj, el kiuj la plej citinda estas Finnlando. En Polujo, apartenanta cetere al la plej multan alkoholon uzantaj landoj, la kontraŭalkohola movado pli kaj pli fortiĝas, ĉar oni konvinkiĝis, ke alkoholo estas forta malhelpilo en la forta evoluiĝado de la juna ŝtato. Pro la multnombraj alkoholanoj en Polujo. oni ĝis nun ne sukcesis tute malpermesi la publikan uzadon de alkoholo, sed jam depost kelkaj monatoj ekzistas la „pli akrigitaj alkohol-paragrafoj“, kiujn la pola registaro sukcesis leĝigi. La registaro postulas malpliigon kaj likvidon de alkoholvendejoj, allasante tiajn ekzisti nur po unu por 2500 enloĝantoj. La likvido de ne plu ekzistontaj alkohol-vendejoj estas finota ĝis fino de l' jaro 1922. Vendejoj plu ekzistantaj ricevos la permeson tiucelan nur post severa esploro. La vendado de alkoholo estas permesata nur al personoj, aĝantaj ne malpli ol 21 jaroj. Novajo en la prialkohola leĝo estas jena aldono de la 7-a paragrafo: Kiu, ebriiĝinte pro troa uzado de alkoholo, kaŭzas publikan skandalon, aŭ kiu en sama stato estos renkontata en publika loko, devos pagi — senkonsidere je sia konduto — monpunon de 20 000 mk. aŭ estos punata per unumonata malliberigo eventl. eĉ per ambaŭ punoj, ĉe ripetiĝo 100 000 mk. (3-monata malliberigo) aŭ per ambaŭ punoj. Kiu ebriigis alian personon, estos sammaniere punata kiel la ebriulo mem kaj krom tio estas plene responda por ĉiui malutiloj kaŭzitaj per la aliulo. El supre cititaj frazoj evidentiĝas, ke la pola registaro serioze celas limigi la alkoholuzadon, kaj je favoraj cirkonstancoj pli poste ĝi tute malpermesos publike uzadi kaj vendadi alkoholon. Dezirinde estas, ke en ĉiuj landoj oni kontraŭbatalu almenaŭ la troan uzadon de alkoholo, kaŭzanta nur la plej diversajn malsanojn kaj plimalgrandiganta la havaĵon de la popoloj. La maluzado de alkoholo multe helpos nobligi la homaron kaj plirapidigos la estiĝon de pli feliĉaj tempoj por nia posteularo. — Jam Goethe, la fama germana poeto, diris en sia taglibro (1779—80) jenon: „Oni povus ankoraŭ pli multe, ja nekredindajoin plenumi, se oni estus pli modera.“ *Pola Esperanto Servo.*

La forĝisto.

Laŭ Leopoldo Staff
(el la pola lingvo).

La multvaloran masón de kruda metalo,
Kiu mistere kuŝas en la brust' profunda,
Mi ĵetas sur harditan amboson el ŝtalo
Vulkano kvazaŭ fajra el faŭko profunda.
Tondr'-martele mi batas urĝante laboron,
Ĉar plenumi mi devas taskon grandaferan:
El metalo mi volas forĝi al mi koron,
Koron harditan, fortan, kuraĝan, fieran.

Se tamen krevos koro sub fero martela,
Se falos nerezista kontraŭ ŝtala bato,
Mi ĝin frakasos tondre sen la kompato;
Ĉar morti tuj pli bone sub bato kruela
Ol vivdaŭri de propra senfort' malbenita
De kaduka senpovo mallaŭde fendita!

Leono Zamenhof.

Kiel propagandas la Esperantidoj.

En n-o 69 de ET ni atentigis pollandajn s-anojn pri la malinda propagando de „Esperantidoj“. Diversaj s-anoj sin turnis al ni kun peto publikigi en ET, ke ili estas ne Esperantidoj, des pli ne estas iaj konsuloj Esperantidaj, kiel tion publikigis la gvid. de la „Tutpolia Esperantida Konsuleyo“ s-o Zgórzewski en Warszawa. La protestojn ni sinsekve publikigis en ET sub anoncetoj. El la tuta afero evidentiĝas, ke la Esperantidoj pro manko de kunlaborantoj kaptas la nomojn de iuj ajn Esperantistoj kaj penas per ili fanfaroni. Ĉar ilia ruza propagandmetodo jam konatiĝis, ili uzas frazojn kiel jena „. . . . kiolo volas labori, kay timas, ke la ‚liberaman fraton‘ (laŭ la modelo de Czestochowan, Polio) cestos lu saluti sur la strato, alivoy al nia movado sub pseudonomo!“ (Vidu febr. n-o de „Esperantida“).

Cetere karakteriza estas jena frazo en la samnumera gazeto: „. . . en Planice (Cheskoslovakio) laboris soro pastro Zhelezny. Hodie existas en Planice ef ne un esperantisto kay idisto. Dey omni lerneyon en Planice flirtas sole la verda standardo kun blanka stelo.“

Sed okazajo montranta senfinan arogantecon de la nunaj gvidantoj de la Esperantida movado estas jena: En novembra n-o de „Esperantida“ 1921 aperis sciigo de „Tutpolia Esp-ida Konsuleyo“, ke s-o Aloizy Smura, vigla s-ano de nia urbo Bydgoszcz, fariĝis loka konsulo de Esperantido. Tuj kiam s-o Smura sciiĝis pri tio, li venis al ni kun peto protesti kontraŭ la misuzo de lia nomo kaj samtempe direkti oficialan skribon a la „Konsuleyo“ postulantan reprenon de la nevera sciigo. Ni faris laŭ peto de s-ano Smura.

En marta n-o de „Esperantido“ aperis nun korekto, sed tiel stranga, ke legante ĝin oni ne

Ni salutas la naciajn Esp. kongresojn kaj deziras al ili plenan sukceson.

Pentekosta revado.

Mi sidis sur benko ĉe la arbarorando. La freŝa matenvento blovis ĉirkaŭ mi, la foliaro de l' arboj muĝadis, la birdoj kantetis, kaj la hela suno radiis el la blua firmamento sur la brila pejzaĝo. Aliĝis la sonoj de l' koncerto en la valo. — Longe mi sidis kaj revis. Kaj fine la sonoj de l' muziko fariĝis sopiro, kaj sopiro fariĝis ĉio ĉirkaŭ kaj en mi. — Ekflugis la papero, kiu kuŝis sur mia genuo. Mi revekiĝis kaj skribis sur ĝin: Ho, amatino, kial vi ne estas ĉe mi? Ĉio estas tiom belega. Printempo estas en la tuta naturo. Ho, venu, por ke fariĝu printempo ankaŭ en mia animo . . .

La vento malvigliĝis, kaj la arbara muĝado preskaŭ tute silentiĝis. Nur la birdetoj trilis dolĉajn melodiojn. — Ankoraŭ mi sidis kaj revis.

Jen mallaŭta bruado en la arbetajo. Nevole mi flankenrigardas, kaj — ho, dolĉa teruro — inter la disigita foliaro elrigardas ŝi a j radiantaj okuloj, ŝi a bone konata vizaĝo, elrigardas ŝi mem, la amata! — Ŝia blanka vesto estas orumata per la brila suno, la venteto karesante ludas per ŝiaj malhelaj bukloj. Kaj mi havas la impreson, el inter ĝia muĝado aŭdi ŝian amindan buŝon:

Ankoraŭ tempeton, tempeton nur!
Mi venos, certe, mi venos. — —

Leono Funken, Koblenz.

scias, ĉu ridi aŭ resti plu serioza. Ĝi tekstas jene: „N. B. Pro ke soro Smura el Bydgoszcz farivis ‚duvizaja', C. O. de T. E. K. exigas lu kay atentigas pri la misuzado de l' nomo ‚esp-ido' dey li."

Samtempe ricevis s-o Sm. pk. de „Universala Ligo Esperantida", subskribitan nur per du literoj J. Z. (verŝajne s-o pastro Jaro Zelezny, la gvid. de la tuta „movado Esp-ida" timas, ke lia nomo konatiĝu?). La enhavo de la pk. estas cetere tiel arogante-ofendema, ke ni ne hezitas publikigi la enhavon al la legantaro: „... Pro kio ni publikigis Via nomo (rigretinde!) en nia gazeto. Sparoy monu k. restoy fidela al la proverbo: Shuisto tenoy via botu! Omni malsajolu devas rimarki tuy, kiu vi celas per tie naivan qestionon en nia tendaro. Se vi ne cestos, ni atentigos pri Via grandanimeco verdstelana en la rubriko ‚Kio ne estas Esp-ida'. Eble sufitas al vi tio ci! JZ."

Komentario estas superflua! La Esperantistoj havos almenaŭ etan imagon pri la gvidantoj de la Esperantida movado! Menciinde estas ankoraŭ, ke sur la sama pk. troviĝas iena surstampita propagandfrazo ĉehlingva: Prihlas se do pisemn. bezplat. kursu: Esperanta; kio signifas Esperante: Aliĝu al senpaga skriba kurso de Esperanto. Do eĉ „Universala Ligo Esperantido" mem misuzas la nomon „Esperanto", trompante tiel la publikon, kiu sub nomo de Esperanto lernos Esperantidon kaj miros poste ĉe interrilatiĝo kun veraj Esperantistoj, ke ilia „Esperanto" diferenciĝas de ties.

La celo de Esperantidoj estas klara, ili volas perforte estigi en niaj vicoj konfuzon! Devo de niaj „Lingvaj Organizafoj" estas atenti la malsinceran, — eble malpli danĝeran, — laboron de la Esperantidoj.

Ni bedaŭras, ke ni estis devigataj publikigi supran artikolon, kaj deklaras, ke ni kontraŭbatalas nek Esperantidon mem nek ĝian aŭtoron s-on René de Saussure, sed sole la nunajn malhonestajn reprezentantojn de Esperantida movado. „Amicus Plato, sed magis amica veritas!"

Pola Esp. Servo en Bydgoszcz (Pollo)
Fr. Prengel, gvid.

Antaŭen!

Antaŭen fratoj ĉiam vi,
Ni murojn rompu antaŭ ni!
Ĉar antaŭ ni, post tiuj muroj,
Estonto brilas en lazuroj . . .
Ni la ideojn devas nur
Je viva vesti la kontur',
Ke estu ili ne nur frazoj,
Sed por novmondo fortaj bazoj,
Sur kiuj baldaŭ tuthomar'
Ekstaros kiel amikar'.

Do iru ĉiam ni al celo
Kun forta kred' kaj sen ŝancelo,
Malgraŭ survoja akra kard' . . .
Fiere flirtu la standard',
Ĝis kiam nia sanktafero
Ekregos venke sur la tero.
Dume antaŭen fratoj vi,
Ni murojn rompu aataŭ ni!
Ĉar antaŭ ni, post tiuj muroj,
Estonto brilas en lazuroj! . .

Stanislaw Karolczyk.

TEKA.

La TEKA komunikas, ke dum la XIV-a Kongreso en Helsinki okazos fakaj kunvenoj de kuracistoj, organizataj de TEKA. Kolegoj estas afable petataj prepari sciencajn prelegojn por tiuj kunvenoj kaj sendi la temojn al la finnlanda konsulo de TEKA, D-ro Artturi Salokannel, Punkaharju, Takaharju, Finnlando, kiu prenis sur sin la organizon de la nomitaj kunvenoj.

La taskon de kasisto de TEKA prenis sur sin provizore la vicprezidanto D-ro Briquet, 31 rue de la Bassée, Lille, Francujo. Ĉiuj konsuloj kolektu la monon de siaj landaj anoj kaj bonvolu ĉiumonate sciigi pri la kalkuloj la kasiston aŭ transsendi al li la enspezojn.

Konsuloj de TEKA ekzistas ĝis nun en jenaj landoj:

1. Anglujo: D-ro Primmer, Struan Bank, Cowdenbeath, Skotlando.
2. Aŭstrio: D-ro Sós, Tuchlauben 18, Wien I.
3. Bulgarujo: S-o J. N. Zlateff, V. Tirnovo.
5. Ĉeĥoslovakujo: D-ro Bischitzky, Mikulaŝska 12, Praha.
5. Finnlando: D-ro Artturi Salokannel, Punkaharju, Takaharju.
6. Francujo: D-ro Briquet, 31, rue de la Bassée, Lille.
7. Germanujo: D-ro Kleider, Kaiserstr. 7, Nürnberg.
8. Hispanujo: D-ro Maraury, Real 45, San Fernando (Cadiz).
9. Hungarujo: D-ro Lorand, Damjanich u. 56, Budapest VII.
10. Nederlando: D-ro Mees, Sundastraat 31, s'Gravenhage.
11. Polujo: D-ro Ŝtelman, Piotrkowska 68, Lodz.
12. Svisujo: D-ro Uhlmann, Basel, Chem. Industrie.
13. Turkujo: D-ro A. Stamatiadis, Tépé-Bachi 59, Pera, Konstantinopolo.
14. Usono: D-ro Van Becelaere, 2508 First Str., San Diego, Kalifornio.

Por la TEKA-Komitato:
D-ro *W. Róbin*,
Varsovio, Marszalkowska 113.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esp. budo en la Foiro de Paris.

La Foirkomitato disponigis senpage grandan budon al la Pariza Esp. Grupo, Strato de la Eksportado n-o 1003-1005. Kelkaj miloj da propagandiloj estas disdonitaj dum la foiro kaj centoj da lernolibroj venditaj, multaj adresoj kolektitaj. La budon vizitis ankaŭ la prezidanto de la Komerca Ĉambro de Paris kaj la prezidanto de la Foira Komitato. Vizitoj de francaj kaj alilandaj samideanoj. La Foiro korespondas en Esperanto. Adreso: Comité de la Foire de Paris, 8, Place de la Bourse, Paris 2.

La Societo de Bulgaraj Verkistoj kaj Publicistoj

en komuna kunveno de 9. aprilo 1922, aŭskultinte la referaton de sia membro Atanas D. Atanasov, vicprez. de Bulgara Esperanto Societo, decidis, doni sian plenan moralan helpon al la disvastigantoj de Esperanto inter la bulgara popolo kaj inviti ĉiujn inteligentajn fortojn kaj kultur-klerigajn societojn kaj organizajojn ekinteresiĝi pri tiu lingvo kaj kunlabori por ĝia disvastigo.

Festo por rusaj malsatantoj en Lyon,

aranĝita de la Laborista Esp. Grupo, estis partoprenata de ĉ. 1000 personoj kaj havis bonan sukceson. Nova kurso funkcias.

En la Lernejo de Socialaj Studoj por Virinoj en Genève, Svis.

funkcias Esperanta kurso.

S-o Hudson en Berlin.

Okaze de la ĉeesto de s-o Hudson el Melbourne, la Esp. Gruparo Berlin rapide aranĝis propagand-vesperon, kiun oni anoncis per 650 afiŝkolonoj kaj la ĉiutaga gazetaro. Pli ol 300 personoj ĉeestis. S-o Hudson paroladis parte angle, parte Esperante pri siaj spertoj kun Esp. dum la mondvojaĝo; la paroladon tradukis d-ro Pohl (angle) kaj s-o Gube (Esperante). Rezultato: nova kurso.

S-o Hudson vizitis ankaŭ la grupojn en aliaj urboj, ekz. Köln, Potsdam k. a.

En Essen, Germ.,

s-o Pillath, ekzamena komisario ĉe Esp. Instituto por la Germ. Respubliko, gvidas novan, someran kurson ĉe Akademiaj Kursoj kun 53 geaŭskultantoj.

En Timiŝoara, Rumanio

s-o A. Bambach komencis novan kurson en la urba knaba lernejo.

Aŭstralio.

En Melbourne kurso al skoltoj. — Nova grupo en Porepunkah. — En Nov-Zelando ekzistas grupoj en Auckland, Wellington, Christchurch, Whangarei, Palmerston North kaj Greymouth.

Esp. blindulo

s-o David Chiossone, instruito de s-o C. Ricca, deklamis kun granda sukceso en Esperanto dum festo ĉe la Instituto-Rifuĝejo por Geblinduloj en Genova, Italujo.

II-a Rumania Esp. Kongreso en Cluj, 1.—3. Julio 1922.

La tutlanda Esperantistaro fervore preparas sin al la kongreso, kiun honoras per ĉeesto ankaŭ eminentaj eksterlandaj Esp. gastoj. Detalan programon vidu en posta numero de ET. — Aliĝojn jam nun akceptas la Loka Kongresa Komitato (kongresa kotizo 25 leoj). Adreso: Esperanto Oficejo Cluj. — Aliĝoj nur kun samtempa ensendo de kotizo estos konsiderataj.

En St. Gallen, Svis.

paroladis la 5. majo prof. d-ro Dietterle, hejmveturante de la Geneva konferenco, en la aŭlo de Komerca Altlernejo pri la konferenco. Ĉeestis ĉ. 100 personoj, inter ili reprezentantoj de la kantona eduka departmento. — La movado vigliĝas en St. Gallen. Du lokaj privataj lernejoj enkondukis Esperanton en la instruprogramon, kaj internacia lernejo intencas fari ĝin dum somero.

Al ĉiulandaj Pacifistoj.

La 8.—16. aŭgusto okazos en Helsinki (Finnlando) la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto. Ĉar inter la eksterlandanoj alvenontaj al la Kongreso estos multaj pacifistoj, la Finnlanda Pacifista Ligo (Suomen Rauhanliitto) decidis uzi tiun okazon por aranĝi dum la Kongreso fakan kunsidon de Esperantistaj pacifistoj, kie oni diskutos inter alie la demandon pri la signifo de Esperanto por pacifista movado. Propónoj pri aliaj diskutotaj demandoj kaj farotaj paroladoj bonvolu sendi al s-o A. Selinheimo (adreso: Helsinki, Finnlando, Konstantinstr. 25).

Ni esprimas nian esperon, ke multaj pacifistoj partoprenu en ĉi tiu kunsido kaj ke ankaŭ finnlandaj pacifistoj ricevu per ĝi vekiĝon kaj instigon por sia propra enlanda laboro.

Por Finnlanda Pacifista Ligo:
D-ro Felix Iversen. *A. Selinheimo.*

Gazetaro.

La Provincias, Valencia, Hisp., 20. 5. (Art. pri okazonta hisp. Esp. kongreso en Valencia.)
Jutarnjilist, Zagreb, 21. 5. (Art. pri Esp. en la scenejo de Zagreb.)
Feuille d'Avis, Montreux, 24. 4. (La miraklo de Esperanto.)
Unser Volk, Krefeld, Germ, 28. 5. (Esp. angulo.)
Bürgerblatt, Emmerich, Germ., 25. 5. (Art. pri Esp., de Jos. Kral.)
Vorwärts, Berlin, 20. 5. (Art. pri parolado de aŭstralia s-ano Hudson en Berlin.)
Neue Berliner Zeitung (12 Uhr-Blatt), Berlin, 19. 5. (Art. pri s-o Hudson.)
L'Humanité, Paris, 21. 5. (Art. de F. Lanty: La lingva situacio; kelkaj faktoj.)
Neue Züricher Zeitung, Zürich, Svis., 21. 5. (Art. pri Monumento al D-ro Zamenhof.)
Bote für Stadt und Land, Xanten, Germ., 24. 5. (Esp. angulo, artikolo kaj anonco pri Esp.)
Pri la Esp. konferenco de Genève parolis ankoraŭ jenaj francaj gazetoj: Le Carnet de la Semaine, Paris, 20. 5.; La Lanterne kaj Le Rappel en Paris; La Croix ĉefa katolika organo de Francujo en Paris, 21. 4; Le Télégramme, Toulouse. — Svisaj gazetoj: Le Peuple Yverdon; Journal du Jura, Bienne; La Cooperation, Basel.
L'information Universitaire, ĉs, Paris, 20. 5. (Pri instruado de Esp. en Italujo.)
L'Excelsior, Paris, 26. 5. (Publikigis ilustrafon pri la Esp. budo en la Pariza Foiro, kun favora artikolo.)
Courrier de Genève, 7. 5. (Esp. kaj la katolikaro.)

Al la XIV-a Kongreso de Esperanto en Helsinki aliĝis ĝis 31. majo 636 kongresanoj el 21 ŝtatoj kaj 5 kontinentoj.

(Laŭ telegramo ricevita dum la presado de tiu ĉi numero.)

Pokalo de mia vivo.

Laŭ Leopoldo Staff
(el la pola lingvo).

Ho, kiel garde portas mi koron trempienan,
Kun kia timo mi ĝin portas tra la vivo
Evitas vojon mi danĝeran, malebenan,
Vojojn malrektajn, rokajn kun kruta deklivo.
Ĉar grandapene donis al ĝi mi trankvilon,
Grandapene donis kvieton serenan —
Ŝirmon por lacigitoj, silentan azilon.
Ho, kiel garde portas mi koron trempienan!

Ho, kiel garde portas mi mian pokalon,
Kun kia timo iras mi sur voj' sen skuo
Evitus festojn mi, ĉiun regalon,
Kie sonas toastoj kun ebria bruo.
Sur ĝi fendon gravuris, ho ve, jam doloro!
Kun kia peno longe mi tiun kristalon
Plenigis per de larmoj vin', per sang' elkora,
Ho, kiel garde portos mi mian pokalon!

Leono Zamenhof.

Recenzejo.

LIBROJ.

KOLEKTO DE LA AKADEMIO. Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto. Laŭ „Universala Vortaro" kaj la tri aldonoj. Presita kiel manuskripto. Sendita senpage al la LK-anoj kaj al la gazetoj, kiuj regule sendas siajn kajerojn al la Akademio. Ne vendebla. (La sama vortaro, tipografie presita, estos aĉetebla en proksima estonteco.)

DEVOJ DE LA HOMO. De Giuseppe Mazzini. El la itala lingvo tradukis Mikaelo Arabeno. 164 pĝ. 11 : 16 cm. Unua eldono 1922. Eldonis Laborista Esperanto Grupo Genova, Via San Luca 4—2. Broŝurita. Prezo ne montrita. Trakuru la mondon, ho ci, multvalora libreto „Devoj de la homo" tradukita en la nova lingvo. Benata estu Esperanto, kiu intencas aŭskultigi al ĉiuj popoloj la parolon de Mazzini. — Citante la moton de l' italo Macaggi akompanantan la libron mi esperas veki la intereson de multaj Esperantistoj, precipe laboristaj samideanoj, por Jozefo Mazzini kaj liaj benportintaj verkoj. Mazzini (1805—1872), advokato en Genova, verkinto de artikoloj socialtemaj, de broŝuroj pri politikaj kaj ekonomiaj demandoj, fondinto de l' asocioj „La Juna Italio" kaj „La Juna Eŭropo" kaj de edukaj institucioj, dediĉis kiel heroldo de l' progreso sian tutan vivon al la socia aliformigo de sia patrolando plejbonsence. — Pro manko de loko estas tute neeble doni eĉ nur skizon de liaj intencoj, klopodoj kaj sukcesoj. Sufiĉu mencii, ke lia tombo en Genova estas hodiaŭ ankoraŭ pilgrima kaj inspira sanktejo de ĉiuj progresemaj homoj. En la verko „Devoj de la homo" mem, kies dekdu ĉapitroj ampleksas legaron etikan, kulturan kaj preskaŭ supermezure idealan, spiras la ideo de l' Esperantismo plej pura. — La libro ne estas romano, tute ne; ĝi ne volas esti legata senatente, sed trastudata kiel serioza verko socia-politika. Precipe tiuj, kiuj okupas sin spirite pri tiaj nun ĉie „ardantaj" demandoj, havas oportunan eblecon konatiĝi kun Mazzini pere de l' Esperanto. Ni dankas la malavarajn donacintojn, kies helpo ebligis presigi la libreton kaj ne malpli ni gratulas la tradukinton pro lia bona al originalo tre fidela traduko. — Pri lingvaj mencilndajoj kaj preseraroj ne estas gravaj kaj ne malgrandigas la valoron de l' verketo, kiu akiros sendube multajn amikojn inter la tutmonda laboristaro kaj nacie pensema homaro. (G. Ajul.)

LA INTERNACIA LINGVO KAJ LA LABORISTA KLASO. 64-paĝa. Prezo 6 leoj. Havebla ĉe „Balkana Liberiga Stelo", str. Veslec 10, Sofia, Bulgario.

La broŝuro estas skribita en bulgara lingvo kaj enhavas (laŭ komunista vidpunkto): Por la internacia lingvo; Esenco de la demando pri L. l.; Al la internaciistoj (letero de H. Barbusse); Opinioj pri Esperanto (Barbusse, Rolland, Gorkij k. a.); El la uzado de Esperanto; Esperanta gramatiko.

GAZETOJ.

La Suda Kruco. Marto. Adreso: Melbourne, Aŭstralio, Box 1567, Elizabeth Str. P. O.
Teristo. Majo. Adreso: Moskvo, poŝtkesto 665, al Stanisl. Szabuniewicz.
Kataluna Esperantisto. Majo. Adreso: Carme 50, Barcelona.
Informa Bulteno de Barcelona Esp. Societo. N-o 2.
Holanda Esperantisto. 18. aprilo kaj 26. majo.
Kosmoglott. Mai.
La Semisto. Marto-aprilo.
Export-Esperantist. Marto kaj aprilo.

PROPAGANDILOJ, AFIŜOJ, PROSPEKTOJ, KATALOGOJ ktp.

FIRENZE. 4-paĝa gvidfolieto. Prof. Grazzini Corrado, del. UEA, str. dei Neri 6, capit.

ESPERANTO-KATALOGO (majo 1922) de Esperanto-Eldonejo Friedrich Ader, Dresden-A., Bamberger Str. 45. — 12-paĝa.

Nia Esperanto.

Nia Esperanto tra la mondo iras
Kaj fidelajn korojn al la servo tiras —
Al la servo tiras, kien ajn ĝi venas,
Kaj el ĉiuj landoj kortributon prenas.

Nia Esperanto sen la akra ŝtalo
Landojn cent konkiras kvazaŭ per batalo
Kvazaŭ per batalo rompas ĝi landlimojn,
Enpenetras ĉie korojn kaj animojn.

Nia Esperanto iras tra la tero.
Kie mankis fido, floras nun espero —
Floras nun espero, senhezita kredo,
Pri estonto nia, de labor' heredo.

Nia Esperanto sonas ĉarme, mole,
Milde, penetrante, veke, apostole! . .
Veke, apostole per potencsonoro
Nia Esperanto vokas al la koro.

Stanislaw Braun.

Ni deziras ankoraŭ pruntepreni

10000—20000 Mk.

(laŭ germana valuto) por la konstruigo de nia nova preslaborejo, kiu estos preta meze de junio. Ni pagos rentumon ĝis 10%, laŭ postulo de la kapitaldonontoj. Tujajn proponojn petas

Fratoj Jung, Horrem bei Köln, Germanlando,
Presistoj de „Esperanto Triumfonta".

Butin & Jung, Godesberg a. Rh.

Poŝĉek-Konto Köln 92036 — Esperanto-Eldonejo — Poŝĉek-Konto Köln 92036

El la Esperanta literaturo:

Andersen, Bildolibro sen bildoj. (Ĉarmaj skizoj de l' fama dana fabelisto Andersen.)
Argus, Pro kio? Kriminalromano (Bonega, modelstila originala verketo.)
Avsejenko, Fraŭlino Suzano. (Majstre tradukita novelo de nia litova samideano P. de Medem.)
Bölsche, Ama vivo en la naturo. (La eminenta germana biologo kaj natursciencisto Bölsche malkaŝigas al ni la plej intimajn sekretojn de l' naturo.)
Boucon, Humorafoj. (La ridiganta amuzajo; originalajo.)
Devjatnin, Unuaj satiroj. (Originalajo Esperanta.)
Hauff, La kantistino. (Novelo de l' klasikulo germana Hauff, alloga, modele tradukita legajo.)
Dietterle, Vendreda Klubo. (Majstroverko de l' pasinta jaro.)
Hebbel, Gyges kaj lia ringo. (Ĉi tiu verko de l' eminenta klasikulo Hebbel prezentiĝas en nesupereble bela simila Esperanto.)
Jullien, Instituto Millner.
Molière, La malsanulo pro imago. (Ĉefverko de l' franca literaturo.)
Raabe, La nigra galero. (Verko de l' germana rakontisto el la tempo romantika.)

Mendojn oni direktu nur al nia firmo en Godesberg; la eldonejo de ET ne plenumos mendojn por ni.

Ni liveras ĉiujn haveblajn Esperantafojn.

Por simpligi la pagmanieron, ni rekomendas, precipe al eksterlandaj mendontoj, la malfermon de konto ĉe ni.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkuleroj n, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝargas per la dissendo de cirkuleroj.

Prokuras komercajn adresojn.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando.

Interrilatigas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.

Scligas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

Itala Vino

Unuakvalitajn vinojn de la Piedmonto kaj Toskanio eksportas al ĉiuj landoj

La Firmo **GIOVARA** Fedele
Via Ciamarella 5, Torino (Italio).

Plej granda seriozeco.
Oni korespondas prefere Esperante.

Instituto por Plibonigado de Industrio, Metioj kaj Komerco, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio.

(Oficiala titolo: „Ustav pro zvelebování zivností".)

Centro por ofertoj kaj demandoj pri maŝinoj kaj teknikaj helpiloj por ĉiuspecaj metioj kaj industrio.

La Instituto enkondukas procedojn de fabrikado, liveras kaj plibonigas aranĝojn de entreprenoj.

La Instituto senpage disvastigas scion pri teknikaj novaĵoj kaj eltrovaĵoj, celante ilin rapide enkonduki, eventuale entreprenas provojn kaj faras peranton inter firmoj ofertantaj kaj la liverantaj.

Fako por hejmeca industrio prizorgas puntojn, ludilojn kaj vitrajojn por la eksterlando laŭ propraj aŭ liveritaj modeloj, podetale kaj pogrande.

Aĉetado de maŝinoj kontante.

La Instituto estas sub inspekto de la ŝtato kaj de la Komerca Ĉambro, kaj ĝi laboras senpage! Ofertoj kaj katalogoj, en ĉiuj lingvoj, ricevotaj el la tuta mondo, estos je plena dispono al seriozaj interesantoj de ĉiuj fakoj.

Adreso: Komerca Ĉambro, Esperanto-fako, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio.

---

100 diversaj poŝtmarkoj

de Danzig, Saar, Supra Silezio, Memel en travidebla kovrilo — 1 paketo 100 — 10 paketoj 900

	1 serio	10 serioj	100 serioj
„München Gewerbeschau" 1.25, 2, 3, 4, 10, 20 mk.	60	550	5000
„Deutsches Reich" novaj 5, 10, 20 mk.	50	460	4400
Ciferoj 5, 10, 15, 25, 30, 40, 50 pfg.	40		350

Ĉio sur blanka papero, akurate stampita. — La prezoj en germanaj markoj. — Antaŭpago per banknotoj ĉiulandaj.

Postulu la novan juni-prezaron pri kompletaj serioj de Memel, Saar, Allenstein, Danzig, Supra Silezio, Marienwerder, Schleswig (Slesvigo), Bayern (Bavario), Württemberg.

Kontraŭ mondepono mi sendos kolektojn por elektado. Granda elekto en germanaj poŝtmarkoj, novaj koloroj, „têtes-bêches".

Korespondado en lingvoj germana, angla, franca, Esperanta.

S-ino Emmy Schultze, Rogzow bei Köslin, Germ.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto" (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 54
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 284 20.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Unuigo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Litova: Paŭlo v. Medem, Šmelių g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1 a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1
U. Ŝ. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Gablonz'aj Artikloj
Bijuterioj, lumigiloj, perloj.

Produktkapabla firmo serĉas interrilaton kun nur pogrande-aĉetantoj. Prenas sur sin ankaŭ la aĉet-reprezentadon en ĉiuj landoj.

Afablajn aliskribojn bonvolu sendi al la firmo

Kleinwächter & Schwarz,
Gablonz a. N. (Ĉeĥoslovakio).

Cigar- kaj Tabakfabrikejo Mühldorf a. Inn,
Bavarujo, Germ.

ofertas ĉiujn tabakfabrikaĵojn, cigarojn, cigaredojn, fumtabakojn ktp.

Precipe ni ofertas cigarilojn „Espero" kaj serĉas reprezentantojn.

Bonvolu postuli ofertojn pri tabakfabrikaĵoj. Reprezentantoj por en- kaj eksterlando serĉataj.

Altestime
Cigar- kaj Tabakfabrikejo Mühldorf.

Eldonistoj!

La Societo Anonima „Centra Esperanto-Librejo"

Direktoro: s-o F. C. Koens

Bankastraat 2, a — Hago (Holando)

petas eksterlandajn eldonistojn pri alsendo de unu specimeno de jus aperintaj bonaj Esperantaj libroj kaj scligon de novaj represoj.

Esperantaj katalogoj estas petataj.

BRODAĴOJN DE St. GALLEN

por tolaĵo unuakvalitajn vi aĉetas plej profitdone senpere ĉe la fabrikanto.

Postulu specimenojn!

Gottfried Schoch, St. Gallen-Ost, Svis.,
Storchenstr. 31.

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabrikoj
antaŭe **Henri J. Carels.**
50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels
(Ĉefo: H.A. Scharwächter)
63 Weimarstraat, — Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondajoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, **Béziers** (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 hfl., 1 nord. kr., 1 šil., 1 svis. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 3 lir., 7 fmk., 8 kč., 50 pmk., 75 hung. kr., 550 pmk., 500 aŭstr. kr., internacie 5 s-amp. resp.-kup.; ĉe rekta] abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

GASTIGO DUM FERIOJ. Kiuj geesperantistoj senkoste gastigus dum kelkaj semajnoj da ferioj unu germanan junan Esperantiston? Scligojn petas Esperanto Grupo Perleberg, Germanujo.

DEN HAAG (Nederlando). Vizitu la paroladon kun lumbildoj de s-o Urho Sarajas, vic-konsulo de Finnlando el Rotterdam, pri Finnlando, mardon la 6. junio, je 8 h. vespere en „Gebouw de Ruyterstr. 67! Enirprezo 25 cd. — La Estraro de „Fine ĝi venkos".
PS. Rezervu la 16. julio por la festotago al Wassenaar; qliĝu ĉe s-ino Iabrücker, van Beverningkstr. 10, Hago.

MINISTERIO POR INSTRUADO EN POLLANDO ordonis, ke ĉiu 14-jara lernejano devas jam legi „Sinioron Tadeon" de Mickiewicz. Hontu, ke vi ĝin ankoraŭ ne posedas en la perfekta traduko de A. Grabowski. Kun rekomendita alsendo 155 gmk. pagotaj aŭ rekte aŭ al Leipziga poŝtĉekkonto n-o 89775. — Eldonejo „Esperantista Voĉo", Jasło, Pollando. — KRIOJ De L' KORO, de Salo Grenkamp, afrankite nur 8 gmk., ricevebla ĉe supra eldonejo.

ESPERANTAJ INSIGNOJ. Sendu al mi 0,50 hfl., kaj vi ricevos belan insignon. Adreso: „Eperanto-Domo", 25, I., M. H. Trompstraat, Amsterdam, Hollando.

P. MEDEM, Kaunas, Litovujo, forveturante pro malsano eksterlanden, esperas reveni fine de julio kaj petas prokrasti la korespondadon ĝis aŭgusto.

ALVOKO. Interesajn scligojn por la gazetaro petas la Hungarlanda Esperanto Servo sendi de nun al adreso de s-o Endre Hevesi, Budapest VI, Terezkörut 50. — Ni serĉas en ĉiuj gravaj lokoj seriozajn, konstantajn raportantojn. — Efika propagandmaniero por Esperanto. Imitu ĝin!

AMSTERDAM. Fraŭlo serĉas en Amsterdam amikon kun veturilo kaj sportâmanton. — Leteroj al 25, M H. Trompstraat, Amsterdam.

LETERVESPERO. Esperanta Klubo en Split (Jugoslavio) aranĝos la 2. junio poŝtkart- kaj letervesperon por korespondajoj el Eŭropo kaj la 17. julio por korespondajoj el aliaj mondpartoj. Kompreneble ĉiu sendonto ricevos respondon. Adreso: Palmina 9, Split, Jugoslavio, ĉe la prezidanto s-o Rupčić.

APPLETON'S ANNUAL CYCLOPAEDIA, New York. New Series I-XVII, Reg. kaj anglajn librojn astronom. filosof. vendas Eklezia Kons. Becker, Breslau 1, Altbüsserstr. 34, Germanujo.

VIDAĴKARTOJ. Mi povas liveri al vi 40 belajn, kolorigitajn, malsamajn, neuzitajn vidaĵojn el Bratislava kun 3 diversaj, bildflanke surgluitaj poŝtmarkoj, por 1 dolaro, 2½ guldenoj, 5 svis. fk., aŭ samvaloro. — Mi petas ankaŭ korespondadon kun la tuta mondo. — Johano Hamvai, Bratislava, Schöndorferg. 55, Ĉeĥoslovakio, membro de UEA 17902.

ET n-oj 5 kaj 6 deziratai. Faru proponojn al s-o Frans Schoofs, 45 Kl. Beerstraat, Antwerpen, Belg.

ATENTU! Kolektantoj kaj amatoroj, mi volas vendi kelkajn interesajn kolektaĵojn po 72 fotografaĵoj laŭ historiaj motivoj. („La Inquisition", teruraj turmentoj ai junaj knabinoj.) Prezo je demando. Alfred Menke, Postfach 515, Bremen, Germ.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Ad. van Wesemael, studento, Heernislaan, Gent, Belgujo, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. (bfl.) nur kun eksteR-eŭropanoj.

Fraŭlo Nikola Ivanov, str. Regentska 79, Sofia, Bulg., lernanto en mekanika-teknika lernejo, deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj, precipe kun lernantoj de mekanikaj-teknikaj lernejoj pri diversaj temoj; interŝanĝas poŝtmarkojn kontraŭ katalogoj kaj libroj en germana aŭ franca lingvo.

Fraŭlo Georgi Jv. Kovačev, str. Ĥaĝi Dimitr 21, Sofia, Bulg., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiulandanoj.

Lichtenstadt Mihály en Vecsés, Pestmegye, Hungario, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, por interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. aŭ taggazetojn naciiingve presitajn.

Alfred Sover, S. Pärnu 45, Nomme, Estonio, deziras interŝanĝi belegajn poŝtkartojn ilustr. de pejzaĝoj kaj popolkostumoj (bfl.).

Mi vendas pm Litovio de Zeligowski 1000 pecoj 125 gm. aŭ 8 frf. tonte pm. eldoninta sur tiu tereno 160 germ aŭ 11 fr f. Polio 1000 pecoj aŭ 100 bonoj 100 germ. mar aŭ 6 fr. ½ monoj antauen. K. Lichtensztejn, Bialystok, Sobieska 1, Polujo.
(Neniel povante kompreni la enhavon de tiu ĉi anonceto, ni represas ĝin fidele laŭ la manuskripto; eble niaj legantoj komprenos. — Red.)

Poŝtmarkojn de Danzig (la plej novajn) vendas kun 40% plialtigo s-o Wilhelm Machalinski, Danzig, Dominikswall 2; ĉe granda mendaĵo nur 30% plialtigo.

S-oj Alfons Herrmann, Cleve, Germ., Triftstr. 1, kaj Stefano Müllejans, Cleve, Spyckstr., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Sendu 50—100 poŝtmarkojn vialandajn kaj vi ricevos tuj samkvanton da novaj kaj malnovaj germanaj, bavariaj kaj württembergaj, de Ferdinand Hahn, Bremen, Riensbergerstr. 22, Germ.

Fraŭlo Richard Fischer, Schillerstr. 3, Wittenberge-Elbe, Germanujo, insiste elpetas korespondadon kun socialistaj gelaboristoj eksterlandaj.

S-o Ed. Dance, Jaunlatgale, Latvio, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kun ĉiuj landoj.

S-o Jakob Alfred Persson, n-o 3, Svensköp, Svedujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (kuriozaĵoj), leteroj n, fotografaĵojn kaj monerojn kun ĉiuj landoj.

Eld. korp. 491, Charles Peterson, H. M. „Wachtmeister", Karlskrona, Svedujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., amator-fotografaĵojn kaj poŝtmarkojn, prefere kun gardenistoj ĉiulandaj.

S-o Sinclair Söderberg, P. l. 165, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi por ekzercadi Esperanton.

Karlskrona, Svedujo, Enoch Anderberg, H. Allm Läroverket, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Havas multajn malsamajn svedajn poŝtmarkojn.

S-o B. Kofman, ul. Lipowa 48 b., Bialystok, Polio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn, poŝtmarkojn kaj aliajn afojn.

Mi deziras korespondi kun fraŭlinoj. — E. Lichtensztejn, Bialystok, Pol., Sobieska 1.

Aleksandro Birthler, telegrafa mekanikisto, Teiuš, Rumanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj. Mi estas amatorfotografisto, mi interŝanĝas diversajn fotografaĵojn.

S-o Ludoviko Fodor, juristo, Arad-Chišineŭ, Transsilvanio, Rumanio, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o F. Schramm, Zittau, Marschnerstr. 3 b, Saksujo, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kun ĉiuj landoj, ankaŭ Esp. gazetojn.

S-o Friedrich Döppe, Halle a. S., Germ., Landsbergerstr. 11, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Bruno Franowski, Brunnenstr. 8, Berlin, Germ., deziras interŝanĝi original-fotografaĵojn (pejzaĝojn, tipojn) de la tuta mondo. Mi resendos tiom, kiom mi ricevos.

Otto Teach, Grosse Hamburgerstr. 2, Berlin, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn nur kun vidaĵoj de teatroj el ĉiuj landoj.

S-o Max Pompe, Lodz, str. Piotrkowska 259, Pollando deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ka leteroj.

S-o Reinhold Wagner, Lodz, str. Glówna 18, Pollando, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj kaj leteroj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Josef Kuttelwascher, Wien XV, Gersinerstr. 3, II., pordo 7, serĉas interrilatojn nur kun seriozaj poŝtmark-kolektantoj en ĉiuj landoj.

S-o C. Has, Weimarstrato n-o 346 a, den Haag, Hollando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Pelucchi (Esperanto Studanta Asocio), str. Settembrini n-o 3, Milano 29, Italujo. — Esperantistoj! Fondiĝis nova kaj unika Esp. Stud. Asocio, kiu deziras havi vigian korespondadon kun alilandaj Esperantistoj; interŝanĝas ankaŭ ĉiam kaj tre volonte poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr., librojn, gazetojn, Esperantaĵojn.

Redaktoro Werner Odegård, Hudiksvall, Svedujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi ilustrojn kaj Esp. jurnalojn kun Esperantistoj en aliaj landoj, precipe jurnalistoj kaj gebontemplanoj.

Filatelistoj, kiuj sendos al mi 50 aŭ 100 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos la saman kvanton de mia lando kaj aliajn de Suda Ameriko. — Eŭropo, Azio dum la milito. — F. R. Varela, San Francisco 824, Buenos Aires, Argentina Respubliko.

Du samideanoj deziras tutmondajn gekorespondantojn. Adresoj: Hans Graf, Mittellangenau n-o 48, bei Hohenelbe; Josef Funk, Hohenelbe n-o 157, Ĉeĥoslovakio.

Mi deziras korespondantojn Esperantistajn de ĉiuj patrujoj, sen temoj de specialaj konversacioj. — F-ino Henriette Palandre, 1, Montée du Mont Sauvage, „Croix Rousse", Lyon, Francujo.

S-o Lazaro Abramovič, Bahmut, Ukrainio, Ruslando, Charkovskaja 65, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj kaj poŝtkartoj ilustritaj (bfl.) kun ĉiuj landoj.

Maurice Jaumotte, lingvoprofesoro, 79 Rue St. Laurent, Antwerpen, Belgujo, deziras rilatojn kun ĉiulandaj spertaj geesperantistoj por organizo de manskribota rondira gazeto.

F-ino Heleno Rössler, Timišoara, Rumanujo, IV. Bulev. Berthelot, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj (bfl.) kaj interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Kiu sendas 50-100 poŝtmarkojn de sia lando, ricevas la saman kvanton ĉeĥoslovakajn de Bruno Gahler, Trautenau, Anastasiusg. 3, Ĉeĥoslovakio.

F-ino Irja Mäkelä, 15-jara liceanino, P. Rautatiekatu 15 A, Helsinki, Finnlando, deziras korespondi.

S-o Ignacy Goslawski, Targowa 24, Lodz, Pollando deziras korespondi per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj.

S-o D. Grasiani, bul. Dondukov 46, Sofia, Bulg., interŝanĝas neuzitajn poŝtmarkojn kaj monbiletojn kun ĉiulandulo].

M. J. Peukert, Komotau, Ĉeĥoslovakio, sendas 55—50 malsamajn poŝtmarkojn por sama kvanto el aliaj landoj, poŝtkartojn ilustr. (bfl.)

F-ino Sofi Hedlund, instruistino, deziras korespondadi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun samideanoj de ĉiuj landoj. Adreso: Overkalix, Svedujo.

F-ino Ester Hellström, malsanulistino, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun samideanoj de ĉiuj landoj. Adreso: Overkalix, Svedujo.

21-jara sveda studento deziras korespondadi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun gesamideanoj de la tuta mondo. Adreso: Erik Aspberg, Boden, Svedujo.

Kontraŭ 50—200 poŝtmarkoj vialandaj mi sendos la saman valoron de aŭstriaj poŝtmarkoj. Rudolf Puchta, Wöllersdorf 2, Niederösterreich, Aŭstrio.

Göста Henriksson, Nygård, Sandviken, Svedujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi.

Ake Liljestrand, Karlslundsgatan 9, Örebro, Svedujo, interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o J. B. E. de Koster, M. H. Trompstraat 25, I., Amsterdam, Holando, deziras ŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, fotografaĵojn kun bestoj kaj naciaj kostumoj.

Delattre, profesoro, 172, rue Wayez, Bruxelles, Belgio, sendas 50 aŭ 100 poŝtmarkojn malsamajn — malnovajn, novajn - kontraŭ sama kvanto de alia lando.

F-ino Rita Vleugels, De Bosschaertstr. 74, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj. (19-jara fraŭlino.)

F-ino Martha L'homme, 17-jara, Lange Van Peltstr. 45, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Heinrich Raab, Bad Reichenhall, Germanujo, Kammerbotenstr. 4-III, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Alfred Kiehslich, lignajisto, Uhlandstr. 22, Dresden, Germ., deziras korespondi kun samideanoj ĉiulandaj.

Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergstrasse 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe ekstereŭropaj. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn.

Poŝtmark-kolektantoj atentu! Mi serĉas filatelistajn interrilatojn kun la tuta mondo. Mi ŝanĝas kaj vendas. Mi posedas grandan aron da belaj aŭstriaj poŝtmarkoj. Kontraŭ referencoj mi forsendas belajn elektaĵojn de aŭstriaj poŝtmarkoj, por aĉeto aŭ vendado. — Josef Kolnhofer, Wien 15/4, Zehetnergasse 57.

S-o Olavi Parkkinen, Laivurinkatu 15-12, Helsinki, Finnlando, deziras korespondi kun skoltoj(in)oj, interŝanĝante poŝtkartojn kaj skoltajn fotografaĵojn.

S-o A. A. Jurvanen, 17-jara liceano, L. Kaivopuistok. 4 (dum somero: Malm, Boxbacka), Helsinki, Finnlando, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Pli malkare ol ĉie. — Kontraŭ referencoj ni forsendas poŝtmark-elektojn. Liverebiaj de ĉiuj landoj, speciale polaj, ukrainaj, rusaj ktp. Al demandoj aldonu por respondo. Eldonejo „Esperantista Voĉo", Jasło, Pollando.

21-jara idealisto deziras korespondi pri socialista junularo, elmigrado, per poŝtkartoj kaj leteroj, precipe kun fraŭlinoj. Josef Eder, Lankowitz 100, I., Stirio, Aŭstrio.

S-o Nikola Ivanov, str. Regentska 79, Sofia V, Bulg., deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj.